ISSN 2072-5825

# Espero Katolika




Numero 10-12/2016

Oktobro-Decembro 2016

**JARKOLEKTO 112 - N. 1143-1145 - Oktobro/Decembro 2016**
*Finpresita la 30.12.16* — Finito di stampare il 30.12.16

**Sur la kovrilo:** *La vorto "Mizerikordo" staris borde de rivero Tibro proksime de Vatikano, dum la lastaj semajnoj de la ekstervica sankta Jaro, fininta la 20-an de Novembro (v. p. 55).*

## ENHAVO

| | |
|---|---|
| FRANCISKO EN KARTVELIO KAJ AZERBAJĜANO | 51 |
| PATRINO TEREZA DE KALKUTO ESTAS SANKTA | 52 |
| LA "SIGNO" DE KAINO | 53 |
| NENIU MORTIGU KAINON | 54 |
| LA FERMO DE LA JUBILEO | 55 |
| "KATOLIKOJ KAJ LUTERANOJ KUNE ATESTU LA MIZERIKORDON" | 56 |
| LA VENDREDOJ DE LA MIZERIKORDO | 57 |
| PAPO FRANCISKO 80-JARIĜIS | 58 |
| SANA LAIKECO ESTAS MALFERMITA AL TRANSCENDO | 58 |
| RECENZO | 60 |
| FORPASIS LA IAMA SUPERULO DE LA JEZUITOJ | 61 |
| FAJRERO DE EKUMENISMO POR ETIOPIO | 62 |
| ITALAJ KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ EN ASIZO | 63 |
| JUBILEO KAJ FINO | 64 |
| FORVIŜU, INFANO JESUO | 64 |

**Radio Vatikana**, 63

**Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio**

**Elektronika poŝto:** <ikue@ikue.org>
**TTT-paĝoj:** http://www.ikue.org - http://www.esperokatolika.org * **Dissendolisto:** <ikue@yahoogroups.com>
**UEA-konto "ikue-v" * Banko:** "Unione internazionale cattolica esperantista" Roma, Italio
IBAN IT34H0760103200000023290000 - BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

*Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo* - Registrazione presso il Tribunale di Roma
n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

*Presejo* - Tipografia
ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

*Respondeca Direktoro* - Direttore responsabile
Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00010 GUIDONIA RM, Italio
tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

**Espero Katolika**, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de **I.K.U.E.**
**INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA** internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Spirita Konsilanto:** frato Pierluigi Svaldi - **Prezidanto:** Giovanni Daminelli **- Vic-Prezidantino:** Marija Belošević - **Vic-Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Ĝenerala Sekretario/Kasisto, direktoro de la C.O.:** Carlo Sarandrea - **Estrarano por ekumenaj rilatoj:** Stefan Lepping. **Kontorevizoroj:** Norma Cescotti Covelli, Tiziana Fossati, Krzysztof Tomczak.

**“Ke Dio benu Armenion, Georgion-Kartvelion kaj Azerbajĝanon kaj ke Li akompanu la iradon de sia sankta popolo en tiuj landoj”. Per ĉi tiu beno Papo Francisko finis la 5-an de Oktobro, dum la merkreda ĝenerala aŭdienco, la paŝtistan instruon pri sia ĵusa apostola vojaĝo al Kartvelio kaj Azerbajĝano, daŭrinta de la 30-a de Septembro ĝis la 2-a de Oktobro. “La vera misio – substrekis la Papo – neniam estas prozelitismo, sed altiro al Kristo”.**

# FRANCISKO EN KARTVELIO KAJ AZERBAJĜANO

La ĵusa estis la daŭrigo kaj kompletigo de la vojaĝo al Armenio: “Tial mi povis dank’ al Dio” – rekonis Francisko – “realigi la projekton viziti ĉiujn tiujn tri kaŭkazajn landojn, por konfirmi la katolikan Eklezion, kiu vivas en ili kaj por kuraĝigi la iradon de tiuj loĝantaroj al paco kaj frateco”.



*Tbiliso, 30/09/2016, Francisko kun Ilia la 2-a, Katolikoso kaj Patriarko de la tuta Kartvelio*

La Papo esprimis ankaŭ sian dankemon al la civilaj kaj religiaj aŭtoritatuloj de la du landoj, aparte al la patriarko de la tuta Kartvelio Ilia la 2-a kaj al la ŝejko de la islamanoj de Kaŭkazo. Pri ĉi-lasta Francisko diris: “Lia atesto faris multe da bono al mia koro kaj al mia animo”.

“Kartvelio kaj Azerbajĝano” – aldonis la Papo – “havas tre malnovajn historiajn, kulturajn kaj religiajn radikojn, sed samtempe ili travivas novan fazon”. Ambaŭ solenas ĉi-jare la 25-an datrevenon de sia sendependiĝo, ĉar dum granda parto de la dudeka jarcento ili restis sub la sovetia reĝimo: “La katolika Eklezio estas vokata ĉeesti, resti proksima aparte sub la signo de la karitato kaj de la homa promocio; kaj ĝi klopodas fari tion en kunuleco kun la aliaj kristanaj Eklezioj kaj komunumoj kaj en dialogo kun la aliaj religiaj komunumoj, certa, ke Dio estas ĉies Patro kaj ni estas gefratoj”.

“En Kartvelio” – diris Francisko – “ĉi tiu misio logike realiĝas per la kunlaboro kun la ortodoksaj gefratoj”. Kaj post mencio de la intensa preĝomomento en Tbiliso kun la asira-ĥaldea komunumo, por la paco en Sirio, Irako kaj en la tuta Proksima Oriento, la penso de la Papo iris al la Meso kun la katolikaj fideluloj de Kartvelio, Meso celebrita en la liturgia memoro de sankta Tereza de Jesuo Infano, patronino de la misioj. “Ŝi memorigas al ni,” – substrekis Francisko – “ke la vera misio neniam estas prozelitismo, sed altiro al Kristo, ekde forta unuiĝo al Li en la preĝo, en la adorado kaj en la konkreta karitato, kiu estas servado al Jesuo ĉeestanta en la plej eta el la gefratoj”.



*Heydar Aliyev de Bakuo, Azerbajĝano Francisko renkontis la ŝejkon de la islamanoj de Kaŭkazo, Allahshukur Pashazadeh*

“La stilo de evangelia ĉeesto estas, se eblas” – daŭrigis la Papo – “des pli necesa en Azerbajĝano, kie plejmulto el la loĝantaro estas islama kaj la katolikoj estas malmultaj centoj, sed dank’ al Dio ili havas bonajn rilatojn kun ĉiuj; aparte, ili konservas fratecajn ligojn kun la ortodoksuloj. Pro tio en Baku, ĉefurbo de Azerbajĝano, ni travivis du momentojn, kiujn la kredo kapablas konservi en la ĝusta rilato: la Eŭkaristio kaj la interreligia renkontiĝo. La Eŭkaristio okazis kun la malgranda katolika komunumo, en kiu la Spirito harmoniigas la diversajn lingvojn kaj donas la forton de la atesto. Ĉi tiu kunuleco en Kristo ne malebligas, sed male instigas, serĉi la renkonton kaj la dialogon kun ĉiuj, kiuj kredas je Dio, por konstrui kune pli justan kaj pli fratan mondon”. ■

***La 4-an de Septembro Francisko sanktproklamis la albanan religiulinon, sekulare: Gonxha Agnes Bojaxhiu.***
***La kanonizo de Patrino Tereza okazis fronte al 120.000 fideluloj kaj 13 inter ŝtatestroj kaj ĉefministroj, ĉeestantaj en Placo Sankta Petro 19 jarojn post ŝia morto kaj 17 jarojn post la komenco de la kanonjura proceso.***

## PATRINO TEREZA DE KALKUTO ESTAS SANKTA

"Estas neniu alternativo al karitato: tiuj, kiuj metas sin je la servo al gefratoj, kvankam ili ne scias tion, estas tiuj, kiuj amas Dion", diris Francisko dum sia prediko. "La kristana vivo, tamen" – klarigis la Papo – "ne estas simpla helpo, kiu venas, kiam vi bezonas ĝin. Se estus tiel, ĝi estus certe agrabla sento de homa solidareco, kiu estigas tujan utilon, sed kiu estus sterila, ĉar sen radikoj. La devontigo, kiun la Sinjoro petas, kontraŭe, estas la vokiĝo al bonfarado, per kiu ĉiu disĉiplo de Kristo metas je ĝia servo sian vivon, por kreski en la amo ĉiutage".

Patrino Tereza de Kalkuto "aŭdigis sian voĉon al la potenculoj de la tero, por ke ili rekonu siajn kulpojn fronte al la krimoj de malriĉeco kreita de ili mem". Papo Francisko enlistigis la forton de la denunco de maljustecoj inter la motivoj de la sanktproklamo de Tereza. "En sia tuta vivo" – li diris – "ŝi estis malavara disdonantino de la dia mizerikordo, kaj ŝi metis sin je dispono de ĉiuj per akcepto kaj defendo de la homa vivo, tiu nenaskita kaj tiu forlasita kaj forapartigita. Ŝi aktivis por la defendo de la vivo, proklamante senĉese, ke 'tiu, kiu ne naskiĝis, estas la plej malforta, la plej malgranda, la plej mizera'. Ŝi kliniĝis sur la elĉerpitaj personoj, lasitaj morti en la stratoj, rekonante tiun dignon, kiun Dio donis al ili".


*La bildo de Patrino Tereza sur la fasado de la vatikana Baziliko, en la tago de ŝia sanktproklamo*

"Mi pensas, ke verŝajne ni havos iom da malfacilaĵoj por nomi ŝin sankta Teresa; ŝia sankteco estas tiom proksima al ni, tiom delikata kaj fruktodona, ke ni laŭinstinkte daŭrigos voki ŝin Patrino Tereza", diris la Papo per improvizitaj vortoj, post esti konfidinta la novan sanktulinon kiel "modelon de sankteco" al la mondo de volontulado.

Post la ceremonio Francisko regalis 1.500 malriĉulojn kaj bezonantojn per tagmanĝo ĉefe el napola pico en la Atrio de aŭlo Paŭlo la 6-a. ■

**Okaze de la sanktproklamo la vicprezidantino de IKUE Marija Belošević realigis novajn broŝuretojn pri Patrino Tereza. Oni trovos ilin je la adreso: www.ikue.org/sanktuloj/tereza_de_kolkato.htm**

***Se vi bonfaras, oni atribuos al vi egoismajn kaŝitajn celojn: ne gravas, bonfaru!***
***Se vi realigas viajn celojn vi trovos malverajn amikojn kaj verajn malamikojn: ne gravas, realigu ilin!***
***La bono, kiun vi faras, estos morgaŭ forgesita: ne gravas, bonfaru!***
***Honesteco kaj sincereco igas vin iamaniere vundebla: ne gravas, estu ĉiam kaj ĉiel sincera kaj honesta!***
***Tio, kion vi konstruis dum jaroj, povas esti detruata en unu momento: ne gravas, konstruu!***
***Se vi helpas la homojn, ili ofendiĝos: ne gravas, helpu ilin!***
***Donu al la mondo la plejbonon el vi kaj oni piedfrapos vin: ne gravas, daŭrigu!***

**Patrino Tereza**

***Finiĝis speciala Jubileo, tiu de la mizerikordo, signo de la tenereco de Dio, de lia mizerikordo plurfoje alvokita, redeklarita en ĉiuj sanktaj tekstoj de la Malnova kaj Nova Testamento.***

## LA "SIGNO" DE KAINO

La unua gesto de mizerikordo, aŭ almenaŭ tiu plej konata en la kristana mondo, kaj mi kuraĝas diri, la plej grandioza kaj senprecedenca, estas tiu farita de Dio rilate al Kaino. Ĉi-lasta estas la unua, kiu ĝuis la mizerikordon de la Kreanto.

Ĉio fontis el fratmortigo. Hororaĵo. Kaj ĝi ne estos la unika en la historio, sed ĝi estis la unua, kiun oni rememoras kun granda reeĥo. Ĝi estas terura, harhirtiga, ĉar, kompreneble, ĝi koncernas du homojn el la sama sango, la unuajn burĝonojn de tiu Edena ĝardeno, kie jam okazis la grava misfaro de Adamo kaj Eva. Kaino plipezigas la situacion.

Sekvas, fare de Dio, plena procesa enketo. Estas pridemandado kaj verdikto: Kaino estos sur la tero *"vaganto kaj forkuranto"*. Tamen: Dio kondamnas, sed ne neniigas; Li ne venĝas pri la kulpulo, sed eĉ: *"al iu, kiu mortigos Kainon, estos venĝite sepoble"*. Li gardas la kulpulon: *"La Eternulo faris sur Kaino signon, ke ne mortigu lin iu, kiu lin renkontos"* (Gen 4,15).

Jen signo de la mizerikordo de Dio. Neniu trumpetado per jobel adresita al la pia Izraelido, neniu anonca Buleo alcelanta la kristanon. Ĝi estas signo… sed kia signo! Neniu devas neniigi la homan estulon: li estas valoro ankaŭ kaze, ke li estas la plej aĉa homo en la mondo.

Certe, tiu de Dio rilate al Kaino estas kondamno: li iros *"vaganto kaj forkuranto"*. La puno estas tuj aplikata, ne eblas akcepta marĉando. Sed la kondamnon ĉirkaŭvolvas garantiaĵo, respondo de mizerikordo: ke neniu tuŝu lin.

*"Ĉu Mi deziras la morton de malpiulo?, diras la Sinjoro, la Eternulo; kiam li deturnos sin de sia konduto, li ja vivos"* (Jeĥ 18,23).

Sed kial Adamo ne intervenis, ne riproĉis kaj punis mem sian filon? Ni emas konstati en la aŭtoritato de la patro la signojn de la rigoreco, de edukado, kiuj devas kondutigi bone, marki en la kapon de la gefiloj la limojn de justaĵoj kaj maljustaĵoj. Sed Adamo silentis. Kial? Verŝajne, ĉar ankaŭ li sentas sin kulpulo kaj bezonas mizerikordon. Li konscias, ke el lia peko fontis ĉiu alia peko, ĉiu perfortaĵo, kiu rompas la harmonion de la kreaĵaro. Li kulpas kaj ne emas surmeti la vestaĵojn de la juĝisto kaj punanto de sia filo. Li silentis kaj atendis.

Li atendis tiun belegan, liberigan kanton de la "Malnova homilio pri la sankta Sabato": Dio, fariĝinta karno kaj krucumita, resurektas, vekas la dormantojn kaj liberigas Adamon el la suferado, dirante al li: *"Vekiĝu, vi, dormanta. Releviĝu el la mortintoj kaj Kristo lumigos vin… Releviĝu, verko de miaj manoj! De jarcentoj da jarcentoj estis pretigita por vi la regno de la Ĉielo"*.



*"Kaino kaj Habel", pentraĵo de Pietro Novelli (1603-1647). Romo, Galerio de malnova arto.*

Estas signifoplena la logoo de la Jubileo de la mizerikordo, aŭtentika teologia juvelo: Kristo, la bona Paŝtisto, portas sur siaj ŝultroj Adamon reakiritan el la infero. La Filo de Dio kondukas la perditan kaj elaĉetitan homaron al tiu *"ornamita eterna loĝejo",* kie estas loko por la tuta, kulpa homaro. Estas loko ankaŭ por Kaino, ĉar *"Dio estas favorkora kaj kompatema, longepacienca*

*kaj indulgema”* (Joe 2,13), kaj Li protektas ĉiun sian kreitaĵon surŝutitan de la digno, per kiu ĝi estis koncipita.

Ĝi estas digno, kiun tro ofte oni subtretis dum la jarcentoj, kun homaj vivoj disŝiritaj de perforto kies prototipo oni taksas Kainon, la unua murdanto de la historio. Li reliefiĝas pro sia abomeneco de “paŝtistoj de lupoj”, kiel diras la itala poeto Giuseppe Ungaretti.

Bedaŭrinde ne malaperis de la homo la perfortema naturo, la praimpulso peki, malobservi, krueli kontraŭ siaj similuloj. En la mondo estas ankoraŭ multaj filoj de Kaino, kiuj daŭre frapas la Abelo’jn, senkulpajn viktimojn, kiuj fekundigis (kaj ĉiutage ili daŭrigas fari tion) la teron per sankteco. Ni dezirus neniigi ĉiujn malicajn Kaino’jn, kiuj atakas en ĉiu mondoparto, ni dezirus ekstermi ilin, malaperigi ilin eterne el la Tero. Ĝi estas utopio. Kaj ni ne forgesu, ke ankaŭ ili ricevis tiun “signon”; ĝi estas la signo de Kaino, jes, stampo de kondamno, sed ankaŭ signo de mizerikordo kaj sur tiu signo surmetiĝis alia, la signo de la elaĉeto: tiu de la Kruco. ■

*Giuliana Caselli*

***Ankaŭ la vivo de krimulo estas sub la ekskluziva kaj supera jurisdikcio de Dio, ĝuste pro la transcenda aspekto de la viro kaj de la virino “kreitaj laŭ simileco kun Dio”. Kontraŭ la patibolaj tentoj, kiuj reaperas, nepras medito pri mortopuno aplikata de la Ŝtatoj.***

## NENIU MORTIGU KAINON

La “enkarniĝo” de la Parolo de Dio en la historio de la homaro igas, ke mortopuno okulumu ankaŭ en la Malnova Testamento. Sed ĝuste en la hebrea Sankta Skribo mem aperas la celatingo, al kiu Dio volas konduki la homaron. Ni pensu je ĉi tiu frazo, kiun oni legas en Genezo 4,15 kaj kiu fariĝis la slogano de italdevena internacia movado “Nessuno Tocchi Caino” (Neniu tuŝu Kainon) kontraŭ mortopuno: “La Eternulo faris sur Kaino signon, ke ne mortigu lin iu, kiu lin renkontos”. Ankaŭ la vivo de krimulo estas sub la ekskluziva kaj supera jurisdikcio de Dio, ĝuste pro la transcenda aspekto de la viro kaj de la virino “kreitaj laŭ simileco kun Dio”.

Kontraŭ la patibolaj tentoj, kiuj reaperas nuntempe, ankaŭ en Italio, la patrujo de Cesare Beccaria – la granda pioniro de abolicihismo per sia verko “Pri krimoj kaj pri punoj” (1764) – necesus memorigi la diajn vortojn raportitajn de profeto Jeĥezkel: “Ĉu mi deziras la morton de malpiulo?, kiam li deturnos sin de sia konduto, li ja vivos. Ĉar mi ne deziras la morton de mortanto!” (18,23.32).

Nu, el tio eblas proponi pli vastan konsideron pri la “kvina ordono”, Ne mortigu, drasta en sia celebro de la netuŝebleco de la homa vivo. Estas facile kompreni, kiel trans la tiom esenca kaj elementa diro de la ordono, interplektiĝas inter si multaj komplikaj temoj, kiuj fariĝis des pli fortaj kaj interplektitaj nuntempe: ni nur pensu je abortigo, eŭtanazio, mortopuno, milito... Kompreneble ne eblas pri tiom delikata temo konstrui laŭsisteman kaj kompletan “moralon pri la vivo” aŭ bioetikon. Ni limiĝos sekve je priskribo de la fundamento de ĉi tiu preskribo, kaj maksimume prezenti unu solan konkretan aplikon pri la justa memdefendo. Ni deiru el la biblia frazo de la Dek Ordonoj (Eli 20,13), *lo’ tirsah*. Ekzegezistoj rimarkigas, ke la uzata verbo ne estas tiu kutima “mortigi”, sed la pli malofta *rasah*, kiu per si mem signifas “plenumi murdon”. Tial, unuavide tio, kion la Ordono kondamnas, neekvivoke estas la perforta ago kontraŭ subjekto sen defendo.


Ni pensu, ĝuste por fari du bibliajn ekzemplojn, je la terura murdo per kolektiva seksperforto plenumita de la loĝantoj de vilaĝo Gibea kontraŭ la dua edzino de levido, gasto en tiu eta urbo de la hebrea tribo de Benjameno (oni legu la tutan eventon en la ŝoka 19a ĉapitro de la biblia libro de Juĝistoj). Alia sensacia ekzemplo de malrespekto de la ordono “Ne mortigu” laŭ la senco supre indikita estus la murdo farita de la reĝa paro Aĥab kaj Izebel, kontraŭ Nabot, rakontita en la 21a ĉapitro de la Unua libro de Reĝoj.

Tamen – kaj jen la embarasiga kaj eĉ “skandalodona” elemento – en la Malnova Testamento estas kazoj, en kiuj murdoj ne estas kondamnitaj, eĉ, iasence ili estas rekomenditaj aŭ eĉ altruditaj:

ni pensu je la t.n. “sankta milito”, kiu inkluzivis la amasmurdon kaj la tutecan detruon de la malamikoj (la “anatemo”, hebree *herem*), aŭ je la mortopuno, sankciita formale por kelkaj murdoj, aŭ ankoraŭ je la “leĝo de la egalrepuno”, kiu al ofendo respondas per ofendo proporcia kaj al murdo per paralela ago por restarigi justecon. Ĝuste pro ĉi tiuj gravaj esceptoj en la kvina Ordono oni uzas la specifan verbon *rasah* kaj ne tiun pli vastan kaj ĝeneralan pri la mortigoj. Kiel oni diris, jen la signo de la “enkarniĝo” de la Parolo de Dio. ■

## LA FERMO DE LA JUBILEO

“Dankemaj pro la donacoj de graco ricevitaj kaj kuraĝigitaj atesti per diroj kaj faroj la tenerecon de via kompatema amo, ni fermas la sanktan Pordon: la sanktiga Spirito renovigu nian esperon je Kristo la Savanto, pordo ĉiam malfermita por tiuj, kiuj Vin serĉas kun sincera koro, la sola pordo enkondukanta en la Regnon, kiu venas”.




Post ĉi tiu preĝo, en la soleno de nia Sinjoro Jesuo Kristo Reĝo de la Universo Papo Francisko fermis la sanktan Pordon de la Baziliko de Sankta Petro en Vatikano, la lasta fermita en la mondo. Finiĝis la 20-an de Novembro la ekstervica Jubileo de la Mizerikordo, inaŭgurita la 8-an de Decembro 2015.

Dum la posta prediko la Papo invitis la fidelulojn ne deturni la rigardon el la vera vizaĝo de nia Reĝo kaj konstrui Eklezion akcepteman, liberan, misiistan, malriĉan, sed riĉan je amo.

“Kristo la Reĝo aperas, diris Francisko, sen povo nek gloro: Li estas sur la kruco, kie Li aspektas pli venkito ol venkanto. Kristo malaltiĝis ĝis ni, Li enloĝis nian homan mizeron, Li atingis la limojn de la universo por brakumi kaj savi ĉiun vivanton. Kun ĝojo ni rekonas lian sinjorecon de amo, sed estus ankoraŭ malmulte kredi, ke Jesuo estas Reĝo de la Universo kaj centro de la historio sen lasi, ke Li fariĝu sinjoro de nia vivo, se ni ne akceptas ankaŭ lian manieron reĝi”.

Kiel Dio fidas je ni mem, tiel ankaŭ ni estas vokataj verŝi esperon kaj doni eblecojn al la aliaj, esti rimedoj de la mizerikordo. “Ni petu la gracon neniam fermi la pordon de la repaciĝo kaj de la pardono,” – finis la Papo – “sed kapabli iri trans la malbono kaj la diverĝoj, malfermante ĉiun eblan vojon de espero”.

Fine de la celebro Francisko subskribis la apostolan leteron *“Misericordia et misera”*, kiun li verkis ĝuste por instigi daŭre travivi la mizerikordon per la sama intenseco de la sankta Jaro. ■



**Infano naskiĝis al ni, Filo estas donita al ni;**
**sur liaj ŝultroj estas la signo de la regado;**
**“Mirinda Konsilanto” estos lia nomo.**

*Enira antifono de kristnaska Meso*

# “KATOLIKOJ KAJ LUTERANOJ KUNE ATESTU LA MIZERIKORDON DE DIO”



***La 31-a de Oktobro estas la dato, kiun de jarcentoj oni festas kiel komencon de la reformacio, en la tago kiam, antaŭ 500 jaroj, Martin Lutero fiksis siajn 95 tezojn al la pordego de la kastel-preĝejo de Wittenberg. La duonjarmila datreveno estos venontjare, sed jam komenciĝis ĝia solenado. Kadre de la luterana-katolika rememorigo de la Reformacio Papo Francisko estis la 31-an de Oktobro en Lund (Svedio), en kies luterana katedralo okazis kuna ekumena preĝado. La dutaga restado en Svedio finiĝis la unuan de novembro per la renkonto kun la eta katolika komunumo de la lando.***

“La mondo atendas komunan ateston de la kristanoj: katolikoj kaj luteranoj kune proklamu la Parolon de Dio”. Tiun ĉi alvokon levis Papo Francisko dum la kuna ekumena preĝo en Lund. En sia prediko la Papo substrekis, ke la disiĝo estis “grandega fonto de suferoj,” sed li ankaŭ klarigis, ke sen la Sinjoro “ni povas fari nenion”.

“Dio estas la Sinjoro de la vinberejo” kaj “la sola afero, kiun Li volas, estas, ke ni restu unuigitaj al lia Filo Jesuo kiel vivantaj branĉoj”. Tiel ĉi Francisko emfazis la profundan signifon de la ekumena movado, kiu en la katedralo de Lund travivis historian etapon. La Papo unue emfazis, ke lia vizito volas “esprimi la komunan deziron resti kunigitaj” al Jesuo por “havi vivon.”

“Ni katolikoj kaj luteranoj” – aldonis Francisko – “komencis paŝi laŭ la vojo de la repaciĝo. Nun, en la kunteksto de la komuna memorceremonio de la Reformo de 1517, ni havas novan okazon de komuna vojo, kiu prenis formon dum la lastaj kvindek jaroj per la ekumena dialogo”. “Ni ne povas rezignacii fronte al la divido kaj malproksimeco, kiuj estigis la disiĝon inter ni. Ni havas la eblecon rebonigi krizan momenton en nia historio, superante disputojn kaj miskomprenojn, kiuj ofte malebligis al ni kompreni unu la alian”.

“Ankaŭ ni” – instigis la Papo – “devas rigardi kun amo kaj honesteco al nia pasinteco kaj rekoni la eraron kaj peti pardonon: nur Dio estas la juĝisto”. Oni devas rekoni “kun la sama honesteco kaj amo, ke nia divido distanciĝis el la origina intuicio de la Dia popolo, kiu nature deziras resti kunigita; kaj historie la divido estis eternigita de potencaj viroj de la mondo pli ol de la volo de la fideluloj”. Tamen, li notis, “estis vera deziro ambaŭflanke konfesi kaj defendi la veran fidon, sed ni ankaŭ konscias, ke ni enfermiĝis en ni pro timo aŭ antaŭjuĝo kontraŭ la kredo, kiun la aliaj konfesas kun malsamaj akcento kaj lingvo”.

“Sendube” – li diris kun bedaŭro – “la disiĝo estis grandega fonto de suferoj kaj miskomprenoj, sed samtempe ĝi kondukis nin al sincera ekkonscio pri la fakto, ke sen Dio ni povas fari nenion, donante al ni la eblecon pli bone kompreni kelkajn aspektojn de nia fido”. Dankeme, li daŭrigis, “ni rekonu, ke la Reformo kontribuis doni pli grandan centrecon al la Sankta Skribo en la vivo de la Eklezio”. “Kiel mi povas havi kompateman Dion?”. Ĝi, daŭrigis la Papo, “estas la demando, kiu senĉese turmentis Luteron”. Fakte, la temo pri la ĝusta rilato kun Dio “estas la temo decida de la vivo”. Lutero “malkovris ĉi tiun kompateman Dion en la Bonsciigo de Jesuo Kristo enkarniĝinta, mortinta kaj resurektinta”. Per la koncepto “nur per dia graco”, oni memorigas al ni, ke Dio ĉiam havas la iniciaton kaj ke Li antaŭas ajnan homan respondon, ke samtempe Li celas stimuli tian respondon. La doktrino pri pravigo, do esprimas la esencon de la homa ekzistado antaŭ Dio”.

“Tiu ĉi” – diris fine Francisko – “estas la atesto, kiun la mondo atendas de ni. Kiel kristanoj ni donos kredindan ateston de la mizerikordo laŭmezure, ke pardono, renoviĝo kaj repaciĝo estos ĉiutaga sperto inter ni”. Kune, li ripetis: “ni povas anonci kaj montri konkrete kaj ĝoje la dian mizerikordon, defendante kaj servante la dignon de ĉiu persono. Sen tiu servo al la mondo kaj en la mondo, la kristana kredo estas nekompleta”. “Ni, luteranoj kaj katolikoj, petu lian helpon por

esti vivantaj membroj kunigitaj al Li, ĉiam bezonantaj lian gracon por povi porti kune lian Parolon al la mondo, kiu bezonas lian tenerecon kaj lian mizerikordon".

Dum la ekumena preĝado Papo Francisko kaj Episkopo Munib Yunan, Prezidanto de la monda luterana federacio subskribis kunan deklaracion. La postan tagon Francisko finis sian vojaĝon al Svedio, celebrante Meson por la malgranda katolika komunumo en Stadiono Swedbank en Malmö. 15 mil homoj ĉeestis la ceremonion en la soleno de Ĉiuj Sanktuloj. En sia prediko la Papo klarigis, ke la Beatproklamoj estas la identigilo de la kristano.

Post la meso, la Papo trapreĝis la Anĝeluson, instigante la svedajn katolikojn esti "salo kaj lumo" laŭ la stilo de Jesuo, "kun granda respekto kaj solidareco al la gefratoj de aliaj kristanaj Eklezioj kaj komunumoj kaj rilate al ĉiuj bonavolaj homoj". ■

## LA VENDREDOJ DE LA MIZERIKORDO

Unu el la karakterizaj eventoj de la fininta Jubileo estis la "vendredoj de la mizerikordo", kiuj reproponis, al la malforta memoro de nia epoko, tiujn 7 korpajn kaj spiritajn farojn, kiuj apartenas al la eklezia tradicio. kiel oni klarigis komence de la Jubileo, la Papo persone praktikis ilin dum la jaro "por substreki la gravajn situaciojn de malagrablo, marĝenigo kaj mizero ĉeestantajn en la socio, unuigitajn tamen kun forta solidareco fare de multaj personoj".

Francisko en Januaro vizitis flegejon por maljunuloj kaj por pacientoj en vegeta vivo; en Februaro, komunumon de eksaj drogemuloj; en Marto, akcepto-centron por rifuĝintoj; en Aprilo li vizitis kun Patriarko Bartolomeo la rifuĝintojn kaj migrantojn en la greka insulo Lesbo; en Majo, komunumon por homoj kun gravaj mensaj perturboj; en Junio du romajn komunumojn por maljunaj kaj suferantaj pastroj; en Julio, dum la vojaĝo al Pollando, la Papo faris sian "vendredon de mizerikordo" silente preĝante en koncentrejo Auschwitz-Birkenau, vizitante malsanajn infanojn en pediatria hospitalo de Krakovo kaj trairante la Krucvojon kun la partoprenantoj en la Monda Junulara Tago. En Aŭgusto, la Sankta Patro iris al la roma komunumo Papo Johano la 23-a, kiu akceptas virinojn liberigitajn de sklaveco kaj de prostituado kaj en Septembro li vizitis postakuŝan kuracejon *(v. foton)* kaj hospicon por mortantoj. Oktobre, Francisko iris al domo, kiu akceptas infanojn en situacio de persona, familia kaj socia malkomforto. La lastan "vendredon" la Papo dediĉis al tiuj, kiuj forlasis sacerdotecon, por proponi signon de proksimiĝo kaj amemo al personoj, kiuj faris elekton ofte nekundividitan de iliaj kunfratuloj, ĉar la Eklezio estas vokata "flegi la vundojn, ŝmiri ilin per la oleo de la konsolo, bandaĝi ilin per la mizerikordo kaj kuraci ilin per la ŝuldita solidareco kaj atentemo".



**La faroj de mizerikordo aŭ kompato** estas tiuj petitaj de Jesuo en la Evangelio (Mat. 25) por trovi mizerikordon, t.e. la pardono de niaj pekoj, kaj por eniri sekve en lian Regnon.

**La sep faroj de korpa mizerikordo:** 1. Doni por manĝi al malsatantoj; 2. Doni por trinki al soifantoj; 3. Vesti la nudajn; 4. Gastigi la pilgrimulojn; 5. Kuraci la malsanulojn; 6. Viziti la prizonulojn; 7. Entombigi la mortintojn.

**La sep faroj de spirita mizerikordo:** 1. Konsili al dubantoj; 2. Instrui al sensciuloj; 3. Admoni la pekulojn; 4. Konsoli la afliktitojn; 5. Pardoni la ofendojn; 6. Elteni pacience la ĝenantojn; 7. Preĝi Dion por la vivantoj kaj la mortintoj. ■

## PAPO FRANCISKO 80-JARIĜIS

Jorge Mario Bergoglio elektis festi sian okdekan naskiĝdatrevenon, la 17-an de Decembro, komencante la tagon kun ok senhejmuloj. Akompanitaj de la papa almozdonanto, mons-ro Konrad Krajewski, ili estis gastoj de la Papo por matenmanĝo en Domo Sankta Marta. Francisko parolis kun ili ĉe la tablo dum duona horo, proponante argentinajn dolĉaĵojn. Poste li atingis la Paŭlan Kapelon por la Meso kun la kardinaloj. Dankante ilin pro la bondeziroj, la Papo kundividis siajn sentojn rakontante anedokton: "De kelkaj tagoj venas al mia menso vorto, kiu aspektas malbela: 'maljunuleco'. Vorto, kiu timigas". Li sciigis, ke iu prelato donacis al li la verkon "De senectute" (pri maljuneco) de Cicerono: "plia guto", li ŝerce komentis. Poste li aldonis mediton: "Mi memorigas tion, kion mi diris la 15-an




*Okaze de la 80-a naskiĝdatreveno de Papo Francisko, Radio Vatikana realigis bildon en kiu estas lia invito "Preĝu por mi", skribita en pluraj lingvoj inkluzive de Esperanto*



*Matenmanĝo kun senhejmuloj*

de Marto [2013] dum nia unua renkonto: 'La maljuneco estas loko de saĝeco'. Ni esperu, ke ankaŭ por mi tiel estu". Kaj citante frazon de latina aŭtoro, kiu skribis, ke maljuneco "venas sur vin per silenta paŝado", Francisko fine diris: "Ĝi estas frapo! Sed kiam oni taksas ĝin etapo de la vivo, kiu estas por doni ĝojon, saĝecon kaj esperon, oni rekomencas vivi. Kaj mi memoras ankaŭ alian poeziaĵon, kiun mi citis al vi: 'Maljuneco estas trankvila kaj religia' [Hölderlin]. Preĝu, por ke la mia estu tia: trankvila, religia kaj fekunda. Kaj ankaŭ ĝoja". ■

***Ni preĝu por nia Papo Francisko: ke Dio konservu Lin longtempe al la Eklezio kaj al la pacosopiranta mondo!***

**La fruktoj de la Jubileo de Mizerikordo, la laikeco, la defioj por la junuloj kaj Eŭropo, kaj plie, la aspiro al sinoda Eklezio, la respondeco de la agantoj por komunikado kaj kelkaj bonaj konsiloj por la pastroj estas la gravaj temoj pritraktitaj de papo Francisko en longa intervjuo publikigita la 7-an de Decembro de la belga flandrlingva katolika semajnaĵo *Tertio*.**

## SANA LAIKECO ESTAS MALFERMITA AL TRANSCENDO

La starpunkto, kiu volas disigi religion de la publika vivo "estas malmoderna opcio". Papo Francisko tiel komencis respondi al la demandoj de la intervjuantoj. Aludante la distingon inter laikeco kaj laikismo li notis, ke laika ŝtato "estas pli bona ol konfesia ŝtato", sed tute ne estas bona la laikismo, kiu fermas la pordojn al transcendo. Tio ĉi, li diris, estas "heredaĵo de la Klerismo". Malfermiĝo al transcendo "estas parto de la homa esenco", ĝi estas parto de la homeco. Do, kiam "politika sistemo" ne respektas tion, "ĝi pritondas, tranĉas la homan personon".

**Neniu milito ennome de la religio**

La Papo respondis poste al demando pri la militoj kaj religia fundamentismo. Unue, li estas konvinkita, ke "neniu religio kiel tia povas inciti militon", ĉar en tiu kazo "oni proklamas dion de detruo, dion de malamo". Francisko redeklaris,

ke "oni ne povas militi en la nomo de Dio", "en la nomo de iu ajn religio". Tio, kio okazas estas la uzo de religiaj misformoj por pravigi terorismon, militon". La Papo agnoskis, ke "ĉiuj religioj havas fundamentismajn grupojn. Ĉiuj. Ankaŭ ni". Tiuj grupetoj, li aldonis, "malsanigis sian religion" kaj kreas "dividojn en la komunumo, kio estas formo de milito".

### Eŭropo bezonas gvidantojn

Francisko daŭrigis turnante sian atenton al la eŭropa kontinento kaj konstatis, kun bedaŭro, ke eĉ cent jarojn post la Unua Mondmilito ni estas ĉiam en situacio de monda konfliktado, sed "popece". Ni diras per la buŝo "Neniam plu milito", estis lia admono, "sed samtempe ni fabrikas armilojn kaj ni vendas ilin" al la samaj, "kiujn oni batalas" je intereso de la armil-fabrikantoj. Oni re-ekvilibrigas la bilancojn per la militoj, aldonis la Papo malĝoje, kaj "la prezo estas tre alta:



*La Papo kun la ĵurnalistoj de* ***Tertio****, Geert De Kerpel (ĉefredaktoro) kaj Emmanuel Van Lierde (redaktoro), kaj mons-ro Luc Van Looy, episkopo de diocezo Gento*

la sango". Francisko notis tial, ke hodiaŭ mankas realaj gvidantoj de Eŭropo kiel estis Schumann, De Gasperi kaj Adenauer, kiuj aktivis kontraŭ la milito. "Eŭropo bezonas gvidantojn, gvidantojn kiuj antaŭeniru".

### Jubileo de la Mizerikordo: ideo inspirita de la Sinjoro.

Grava parto de la intervjuo estas dediĉita al la Jubileo de la Mizerikordo. Francisko substrekis, ke la ideo ĝin proklami ne aperis abrupte, sed ĝi estis daŭrigo de tio, kion faris beata Paŭlo la 6-a kaj sankta Johano Paŭlo la 2-a: "ĝi estis ideo, kiu venis el la Alto; mi opinias, ke ĝin inspiris la Sinjoro", diris Francisko reliefigante la fakton, ke ĝi ne okazis nur en Romo, sed en la tuta mondo. "Multaj homoj sentis sin vokitaj repaciĝi kun Dio", por "senti la kareson de nia Patro". "La mizerikordo – diris plie la Papo citante Bonhoeffer, "estas altkosta kaj estas bonpreza". Ĝi estas bonpreza "ĉar oni devas pagi nenion": "oni ne devas aĉeti indulgencojn". Kaj ĝi "estas altkosta" ĉar "ĝi estas la plej altvalora donaco". Kaj ĝi estas altvalora, rediris la Papo, "ĉar la nomo de Dio estas mizerikordo".

### Sinodeco: la Eklezio naskiĝas el la komunumo

Plie, Papo Francisko parolis pri la sinodeco. La Eklezio – li diris – "naskiĝas el la komunumo", naskiĝas "el la bazo". Pro tio, "aŭ estas piramida Eklezio, en kiu oni faras tion, kion Petro diras, aŭ estas sinoda Eklezio, en kiu Petro estas Petro, sed li akompanas la Eklezion". La sperto "pli riĉa ol ĉiuj" – li daŭrigis – "estis la lastaj du Sinodoj" pri la familio, el kiuj venis *Amoris Laetitia.* Por la Papo, "estas interesa la riĉeco de la malsamaj nuancoj, kiuj estas karakterizaj de la Eklezio". Ĝi estas "unueco en diverseco". Ĝi estas "sinodeco", "ne el la supro, malsupren, sed aŭskulti la Eklezioj n, harmoniigi ilin, distingi". Ĉiu dum la Sinodoj, "diris tion, kion li pensis, sen timi esti juĝata", "ĉiuj estis en la sinteno de aŭskulto, sen kondamni". Estis diskuto "kiel inter fratoj". Tie estis "tre granda libereco de esprimo" kaj "tio estas bele". Petro, aldonis Francisko, "estas la garantianto de la unueco de la Eklezio" kaj "ni devas progresi en sinodeco", unu el la aferoj, kiujn "la ortodoksuloj konservis". Kaj al la junuloj, memorante la sperton de la Monda Junulara Tago en Krakovo, la Papo petis ne timi, ne honti pri la kredo, "serĉi novajn vojojn" kaj "ne emeritiĝi 20-jaraĝaj".

### Amaskomunikiloj: ne al kalumnio, misfamigo kaj misinformado

La Papo poste proponis sian mediton pri la amaskomunikiloj, kiuj, li akcentis, "havas tre grandan respondecon" kaj aparte ili povas formi "bonan aŭ malbonan opinion"; "ili povas konstrui", "fari senmezuran bonon". "La amaskomunikiloj estas konstruantoj de socio", "por pensigi, por eduki". En si, "ili estas pozitivaj", sed "ili povas fariĝi nocaj" ĉar ni ĉiuj estas pekuloj. Francisko menciis kelkajn tentojn de la amaskomunikiloj:

la tento kalumnii, uzi ilin "por malnobligi la personojn, kaj tio aparte en la mondo de politiko". Plie, estas la tento de la amaskomunikiloj fariĝi "rimedoj por misfamigo" tiel "nuligante la personon". Sekve, li avertis kontraŭ la "misinformado", "verŝajne la plej granda damaĝo, kiun povas fari komunikilo, ĉar ĝi orientas la opinion al unu direkto, preterlasante la alian parton de la vero". Francisko petis al la amaskomunikiloj esti "tre klaraj, tre travideblaj", sen fali en la "malsanon de la koto-filio, la emo komuniki skandalon, la malbelajn aferojn kaj tiel fari multe da damaĝo.

**La pastroj ne hontu havi tenerecon**

La lasta penso de la Papo dum la intervjuo al la belga katolika semajnaĵo *Tertio* estis dediĉita al la pastroj, al kiuj li petas ĉiam ami la Virgulinon Marian, neniam senti sin orfoj, lasi, ke Jesuo rigardu ilin, kaj "serĉi la suferantan karnon de Jesuo en niaj fratoj". El tio, li diris, "fontas ĉio". "La pastroj" – instigis fine Francisko – "ne hontu havi tenerecon". "Hodiaŭ ni bezonas revolucion de tenereco en tiu mondo, kiu suferas je koro-sklerozo".

* * *

Dum la interparolo kun la ĵurnalistoj ne mankis humuraj eldiroj de la Papo: "Mi amligiĝis al Belgio. Por mi la plej bela urbo de Belgio ne estas Gento nek Antverpeno [urboj de la vizitantoj, ndlr], sed Bruĝo…". Kiam unu el la du ĵurnalistoj parolis pri sia frato, kiu estas jezuito, kaj ke aparte tio, li estas "bona homo", Francisko rebatis: "Mi estis ekdemandanta al vi, ĉu li estas katoliko…". ■

## RECENZO

Pasis jam 128 jaroj ekde la naskiĝo de nia Literaturo, kiam la pasintan jaron LF-koop eldonis la mirindan "Historio de la Esperanta Literaturo"-n. 128 jaroj, dum kiuj multaj "Vort-lertaj versfaristoj… lingve sin ekzercas" (el Kiom longe atendi? de B. Price Heywod). Sed jam en la antaŭparolo al la eldono de "Sonĝe sub Pomarbo" eldonita en 1957 (nur 70 jaroj pasis de la Unua Libro), Marjorie Boulton skribis: "Mi ekkomprenis, ke Esperanto estas ja artkapabla lingvo taŭga por ebla mondkulturo". Kaj certe ŝi ne estis la sola, kiu pensis tion, fakte la sekvan jaron aperis la "Esperanta Antologio" de William Auld, kiu, eĉ kun noblaj intencoj, komencis kolekti tiun ĉi poemaron, por ke la verkoj ne perdiĝu estontece (kvankam poste – persona opinio – li tro parolis pri si mem)

Pluraj do, dum tiuj ĉi jaroj klopodis verki ion pri la Esperanta Literaturo (Privat, Auld, Janton, Tvarožek…), sed ili kreis ne kompletajn verkojn: ili kolektis nur poemojn kaj parolis pri kelkaj aŭtoroj, aŭ intencis krei kategoriojn sen kunligi unu aŭtoron kun la aliaj laŭtempe, laŭspace, laŭteme, aŭ ili limigis sin krei liston de iliaj plej konataj verkoj, ktp.




Kontraŭe, je la unua rigardo, la Historio, kiun mi havas nun en miaj manoj (unua eldono), estas tre grava verko, en kiu ĝiaj aŭtoroj, la eminenta profesoro Carlo Minnaja kaj Giorgio Silfer, faris pli atentan laboron ol la aliaj. Tio, kion ili faris, estis pli profunde informiĝi kaj serĉi informojn pri la vivo de la aŭtoroj mem enmetante ilin en iliajn tempojn, kaj nur tiel fakte ili povas komprenigi, kiaj estas niaj ĉefverkoj. Sendube estas ĉapitroj de tre granda kaj grava valoro kaj le-

gendaj de ĉiuj; tamen, kelkfoje ankaŭ ili falas en la malnovan kaj malsaĝan kutimon enlistigi kaj verkistojn kaj verkojn, kiuj fakte – la aŭtoroj mem konsciiĝas pri tio – ne estas tiel gravaj en nia literaturo. Klara ekzemplo estas la listo de la poetoj aperintaj en la Antologio Naŭ Poetoj, de kiuj "perdiĝis eĉ la spuroj".

Kaj ankoraŭ kelkfoje oni sentas, ke io mankas. Parolante pri Gaston Moch, ekzemple, oni rapide menciis lin sen konsideri la valoron, kiun li havis por la unua strebo disvastigi Esperanton en Hispanio (vidu la leteron, kiun li skribis al Pedro Dorado Montero la 17-an de majo de 1897-a invitante lin traduki la libron de Beufront "Langue Universelle Esperanto. Manuel Complete" eldonita en Januaro 1892).

Kaj ankoraŭ kelkfoje la kunlaboro inter nur du homoj (kvankam fakte la plejparto estis verkita de S-ro Minnaja) evidentiĝas, ĉar okazas, ke la samaj konceptoj estis ripetitaj dufoje. Ekzemplo estas la paĝoj dediĉitaj al la teatraĵo Ginevra, pri kiu ili – antaŭe Minnaja (Ĉ,6) kaj Silfer poste (Ĉ.11) – tamen el malsimilaj vidpunktoj, priparolis. Kaj la samo okazas kun la ĉapitro dediĉita al Raymond Schwartz. Jam tie S-ro Minnaja parolas pri la teatraj parizaj spertoj, kaj tuj poste (Ĉ 23 – sendube verkita de Silfer) oni parolas alian fojon pri La Verda Kato. Kaj supozeble, en la sama ĉapitro oni parolas pri Sonĝe sub Pomarbo; preskaŭ 100 paĝojn post la ĉapitro dediĉita al Baghy mem. Ŝajnas al mi, bedaŭrinde, ke la Silfera kontribuo estas iomete malutila, ĉar tia malordo ne helpas la leganton kompreni, ĉu ĉi tiu libro estas Historio de la Esperanta Literaturo (kaj do fakte la aŭtoroj rajtis enmeti ĉiujn verkistojn kaj verkojn, sed ne tro detali pri specifaj nomoj), aŭ ĉu ĝi volas esti nur kritika kaj analiza manlibro (tiuokaze multaj nomoj ne devigintus aperi kaj tiu malordo ne estus konsilinda).

Unu afero ŝajnas al mi tre klara. Ni estas ankoraŭ iomete malproksimaj de krei veran Historion, kiu entenu nur Esperantan Kanonon. Povus esti, mi jam scias tion, ke estus ankoraŭ iomete frue, por paroli pri Kanono rilate al nia Literaturo, sed eblintus tion fari, ekzemple, se la aŭtoroj limiĝus al la jaro 1993, t.e. al la eniro en PEN.

Nur unu dubon mi havas ankoraŭ, kaj tio estas: kiaj estis la kriterioj, per kiuj oni kunmetis la finan antologion? Ĉu eblas, ke ne ekzistas Teatra Antologia Parto? Ĉu eblas, ke el la 55 paĝoj de la Poezia Antologio estas nur 2 teatraĵoj? (kial Schwartz, ekzemple, estis tute ne konsiderita?). Aŭ kial eĉ po tri paĝoj de Nikolino Rossi, Mauro Nervi, Giovanni Ricci, sed nur unu poemeto de la gravulo de nia poezio Kaloczay? Ĉu nur italismo?

Sed fine, tio tute ne ŝanĝas la feliĉan impreson, kiun mi ricevis foliumante, legante kaj poste lernante tiun ĉi libron. La Historio de la Esperanta Literaturo estas grava verko taŭga kaj por la jam spertuloj kaj por tiuj, kiuj volas komenci lerni iom pli pri nia verkado. ■

*Riccardo Lamperti*

## FORPASIS LA IAMA SUPERULO DE LA JEZUITOJ



Mortis la 26-an de Novembro en Bejruto pastro Peter-Hans Kolvenbach, iama superulo de la jezuita ordeno, posteulo de pastro Arrupe. Naskita en Nederlando la 30-an de Novembro 1928, li studis lingvistikon kaj estis profesoro en diversaj eŭropaj universitatoj ĝis 1983, kiam li estis elektita je la gvido de la Kompanio de Jesuo, ofico, kiun li konservis ĝis demisiiĝo en 2008. Okaze de lia elekto en 1983 la tiama prezidanto de IKUE, pastro Magnani, sendis gratulan leteron al li, menciante interalie la gastigadon al la roma IKUE-grupo en la Pontifika Instituto por Orientaj Studoj, kies rektoro estis ĝuste pastro Kolvenbach. La eminentulo tiel respondis: "Mi povis ekkoni la afablecon de la Esperantistoj, gastigataj por siaj renkontiĝoj ĉe la Orienta Instituto. Multajn gratulojn kaj bondezirojn por la diversaj iniciatoj, pri kiuj vi skribis al mi". ■

**El la sango de la etiopiaj martiroj venas la espero por nova ekumena irado. Ĝi estas la ĉefa konkludo, kiun tiris historia esploro ĵus rakontita en la dokumenta filmo de la itala katolika televido TV2000 pri la masakro de Debre Libanos. Kvankam ĝi okazis antaŭ 80 jaroj, ĝiaj postsekvoj reeĥas ankoraŭ hodiaŭ en la rilatoj inter la Etiopia Ortodoksa Eklezio kaj la Katolika Eklezio de tiu afrika lando.**

## FAJRERO DE EKUMENISMO POR ETIOPIO

### Je la serĉo de la vero

La masakro de Debre Libanos okazis je la epoko de la itala kolonia okupacio. Ĝi estas unu el la pli gravaj krimoj de la historio kontraŭ kristana komunumo, plenumita de la italoj, plejparte kristanoj kaj katolikoj. Februare de 1937 du junaj eritreanoj ĵetis en la korton de la palaco de la registaro kelkajn bombojn kontraŭ vicreĝo Rodolfo Graziani, kaŭzante la morton de 7 personoj kaj la vundiĝon de Graziani. La italoj respondis per kruela revenĝo: dum tri tagoj Adisabebo estis bruldetruita. La du atencintoj fuĝis al la nordo de la lando, laŭ la strato al la monaĥejo de Debre Libanos. Por trovi ilin la vicreĝo ordonis sangan reprezalion kun miloj da mortintoj. De la 21-a ĝis la 29-a de Majo 1937 ortodoksaj monaĥoj, pastroj kaj pilgrimuloj, ariĝintaj en la monaĥejo de Debre Libanos por la festo de ĉefanĝelo Mikaelo kaj de sankta Tekle Haymanot, fondinto de la monaĥejo en la 13-a jc., estis masakritaj de la soldatoj de generalo Pietro Maletti, laŭ ordono de Graziani. La amasmurdo okazis en izolita loko, Laga Welde, for de atestantoj, ĉar neniu devis vidi tion, kio okazas. Oni mortigis ortodoksajn religiulojn kaj laikojn. Laŭ la lastaj historiaj esploroj, la nombro da viktimoj varius inter 1.800 kaj 2.200, dum la oficiala raporto redaktita de la vicreĝo parolis pri “nur” 449 mortintoj. Ĝi estis la unua fazo de la amasbuĉado. La dua okazis en alia izolita loko, en Debre Berhan, kie kelkajn tagojn poste oni mortigis ankaŭ ĉiujn diakonojn.

### Neniam forgesita masakro

Temas pri unu el la eventoj, kiuj plimulte suferigis la etiopian loĝantaron – klarigis en la dokumenta filmo de TV2000 Simon Tesfamichael, etiopia ĵurnalisto de Radio Vatikana – kaj kiu ruinigis la rilatojn inter katolikoj kaj ortodoksuloj. “Ĝi estis tiom profunda rompo, ke ĝi devigis la etiopiajn katolikojn silenti pri sia kredo, kun evidenta sento de honto. Ni, katolikoj – daŭrigis Simon Tesfamichael – estis preskaŭ taksataj perfiduloj kaj ankaŭ malfideluloj, ĉar ni estis morale koncernataj de la murdo de niaj kristanaj gefratoj”.

### La vojo al repaciĝo

Se tra Debre Libanos dum la historio pasis la vojo de la honto, tutcerte hodiaŭ tra tiu sama loko pasas la vojo al repaciĝo. “La dokumenta filmo, alfrontante laŭ spirito de vero temon tiom dramoplenan – deklaris Simon Tesfamichael – ebligas la realproksimiĝon inter la du Eklezioj”.



*La ortodoksa monaĥejo de Debre Libanos en Etiopio*

La pruvon pri la fajrero de nova ekumena dialogo donis la anonco de la proparolanto de la kardinalo de Adisabebo, Abba Petros Berga, kaj de la proparolanto de la etopia ortodoksa Patriarko, patro Daniel Felek – pri komunaj manifestacioj en 2017 por memorigi la amasmurdon de Debre Libanos, 80 jarojn poste. Ĝi estos grava kontribuo por la konstruo de ekumenismo en la tero de Etiopio. ■

**Gracoplenan Kristnaskon kaj de Dio benitan tutan jaron 2017 al ĉiuj legantoj de la revuo Espero Katolika elkore deziras la redakcio**

MOVADAJ INFORMOJ

## ITALAJ KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ EN ASIZO

La ĉi-jara kongreso de la itala IKUE-sekcio (UECI) okazis en Asizo (3-7 Junio) ĉe la monaĥinejo de la misiistaj franciskanaj monaĥinoj de Maria, tuj malantaŭ la Baziliko de Sankta Maria de la Anĝeloj. Temo de la kongreso estis: "Mi volas sendi vin ĉiujn en Paradizon", vortoj diritaj de sankta Francisko al la popolo, kiam li ricevis de la Papo la aprobon de la "Indulgenco de la Porziuncola". Vendredon la 3-an de Junio posttagmeze estis la akcepto de la kongresanoj kaj ilia enloĝiĝo. Sabaton la 4-an matene post la oficiala malfermo okazis la unua prelego fare de Norma Cescotti pri la "Indulgenco de La Porziuncola" kaj tuj poste oni pilgrimis al ermitejo de sankta Damiano, kie estis celebrita Meso en Esperanto. Posttagmeze oni atingis urbon Perugia per trajno, por viziti la urbon kun la akompano de ĉiĉeronino, kiu bone montris la ĉefajn monumentojn kaj donis la historiajn klarigojn. Dimanĉon matene okazis la jara kunveno de UECI, kaj posttagmeze oni pilgrimis per aŭtobuso al Greccio. Tie, simpatia frato, estro de la Sanktejo, bone klarigis la tiamajn eventojn kaj montris la ejojn, kie tiam vivis kaj preĝis la fratoj. Poste oni veturis al la akvofalo de "Le Marmore". Pro la tempo kaj la malbona vetero ne eblis alproksimiĝi, sed oni miris ĝin el la strato. Vespere post la vespermanĝo frato Pierluiĝi prelegis pri la "Historio de la Jubileoj". Lundon oni vizitis la Bazilikon kaj la tombon de sankta



*Grupo de la kongresantoj en Asizo*

Francisko. Ankaŭ tie juna ĉiĉeronino akompanis la kongresanojn. La vizito daŭris posttagmeze kun etapoj al aliaj vidindaĵoj de Asizo: la Katedralo, placo de la Komunumo kun la templo de "Sankta Maria sopra Minerva", la familia domo de sankta Francisko, la Baziliko de sankta Klara. Mardon matene, fermo de la kongreso. Kiel kutime, ĉiu mateno komenciĝis per la matenaj laŭdoj, ĉiutage estis Meso kaj vesperaj preĝoj. ■

*La vicprezidantino de UECI Norma Cescotti (la virino sidanta centre en la supra fotografio), kiun multaj ekkonis okaze de la Bibliaj Tagoj en Trento de ŝi kunaranĝitaj, fariĝis 90-jaraĝa la 10-an de Julio. Vidante, kiom aktiva kaj dinamika ŝi estas, neniu pensus al tioma aĝo. Sed tiel estas. Multe da koraj kaj frataj bondeziroj ankaŭ de la redakcio de EK.*

## RADIO VATIKANA - ELSENDOJ EN ESPERANTO

La elsendoj okazas trifoje semajne, en la sama horo 21:20 MET (19:20 UTC). **DIMANĈE** kun daŭro 8-minuta kaj **MERKREDE KAJ ĴAŬDE** kun daŭro 9-minuta.


**Por aŭskulti ilin per la Interreto:**
**Rekte je la indikita horo:** http://www.oecumene.radiovaticana.org/esp/diretta.asp

**Laŭpete:** http://www.oecumene.radiovaticana.org/esp/on_demand.asp
**Arkivo:** http://www.radio-vatikana-esperanto.org

**Skribu al: RADIO VATIKANA - ESPERANTO, SCV-00120 CITTÀ DEL VATICANO**
**Ret-poŝto:** <esperanto@vatiradio.va>
Por ricevi retpoŝte la informilon de RV, petu abonon al: <promo@vatiradio.va>

## JUBILEO KAJ FINO

Oktobre de 2016 renkontiĝis en la Domo Kardinalo Wendel en la sarlanda urbo Homburgo ĉirkaŭ tridek personoj por ĉeesti la solenan festadon de la jubileo "Dudekkvin jaroj de katolika Esperanto-asocio en la diocezo Speyer". Tiu suborganizaĵo de la tegmenta IKUE celebris en la Afra-kapelo de la katedralo de Speyer regule po 4 Diservoj jare. Krome ĝi en la regiono, en Germanio kaj en tuta Eŭropo kontribuis multe al la Esperanta vivo. La plej impona videbla rezulto estas la preskaŭ 1500-paĝa kanto- kaj preĝolibro ADORU. Nun ĝi atingis sian dudekkvinjariĝon kaj festis ĝin kadre de Kultura semajnfino de la Sarlanda Esperanto-Ligo.




Post bankedo sacerdoto Kronenberger, la spirita gvidanto, celebris dankmeson. Poste la prezidantino Rita Rössler-Buckel festprelegis antaŭ bildprezenta kontribuo pri la plej gravaj eventoj. Kontribuis al la solena etoso la koruso "Kanti por Eŭropo". Fine disdoniĝis riĉe ilustrita dokumenta kajero por daŭra memorigo.



*La fina Estraro: Anton Kiefer, Rita Rössler-Buckel, Albrecht Kronenberger*

Antaŭ la solenaĵo okazis membrokunveno, en kiu oni unuanime decidis fini la asocian agadon de tiu ĉi eklezie kaj state agoskita societo pro ŝanĝiĝo de la internaj kaj eksteraj cirkonstancoj. Kun aflikto, tamen kun danko kaj bonaj memoroj pri la kuna agado dum tiom longa tempo la membroj disiris konscie, ke ja la organizaĵo ĉesis, sed ke ne ĉesos la unueco, nek la laboro, nek la espero. ■

*Franz-Georg Rössler*

## FORVIŜU, INFANO JESUO

Forviŝu, Infano Jesuo, la larmojn de la infanoj!

Puŝu la homojn demeti la armilojn kaj kunpremiĝi en universala BRAKUMO de paco!

Invitu la popolojn, mizerikorda Jesuo, malkonstrui la murojn kreitajn de la mizero kaj de la senlaboreco, de la nescio kaj de la indiferento, de la diskriminacio kaj de la maltoleremo.

Estas Vi, ho Dia Infano de Betlehemo, tiu, kiu savas nin, liberigante nin el la pekoj.

Estas Vi la vera kaj ununura Savanto, kiun la homaro ofte palpe serĉas.

Dio de la paco, donaco de paco por la tuta homaro, venu vivi en la koro de ĉiu homo kaj de ĉiu familio!

Estu Vi nia paco kaj nia ĝojo! Amen!

***Patrino Tereza***